
# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jmgiaa@gmail.com)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**NOVEMBRO/DECEMBRO 2016** **Nro. 109 (4/16)**




## INTERNACIA ESPERANTO-TAGO.

La 15an de decembro, naskiĝtago de la kreinto de Esperanto, oni celebras la Internacian Esperanto-Tagon, ankaŭ konata kiel *Zamenhof-Tago*. Ludwik Lejzer Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro 1859 en la nuna pola urbo Białystok kaj mortis, 57-jara, en Varsovio, la 14-an de aprilo 1917. Tiel, la venontan jaron oni kunmemoros la 100-an datrevenon de lia forpaso.

## El "día de Zamenhof" en el Grupo Esperantista de Bilbao.

Como ya es tradicional, también este año nos reuniremos en el Grupo para celebrar este "día internacional del Esperanto" y aprovecharemos para reunirnos con amigos a los que, por desgracia, sólo vemos por el Grupo en este día.

Tras una breve charla conmemorativa y de resumen del año que se va, nos reuniremos alrededor de una mesa para dar buena cuenta de la comida y bebidas aportadas por los participantes.

**Día: Sábado 17 de Diciembre.**
**Hora: 19:30.**

## LOKE ...

## KRISTNASKA LOTERIO.

Ĉu vi jam aĉetis la loteribiletojn de nia E-Grupo? Ne atendu ĝis la lasta momento ĉar pasintjare ili elĉerpiĝis. Poste ne plendu!




rio. Ili aĉeteblas en nia sic

*¿Ya has comprado los billetes de lotería del Grupo? No lo dejes para el último momento, que el año pasado se agotaron y más de uno se quedó sin ellos. Luego, que no vengan los lamentos.*

*<u>Compra por Internet</u>.*

*Quien desee hacer la compra de la lotería por Internet no tiene mas que seguir los siguientes pasos:*

1. *Ingresar el importe (5,00 € por billete (4,00 de lotería y 1,00 de donativo al Grupo)) en la cuenta del Grupo que figura en la primera página.*
2. *Enviar un e-mail a la dirección del Grupo (<u>esperantobi@gmail.com</u>) anunciando el envío del dinero.*
3. *Tras recibir el dinero, enviaremos, por e-mail, escaneados, los billetes que se hayan comprado.*

## CUOTAS DEL AÑO 2016.

Cuando queráis, podéis hacer el pago de vuestra cuota anual. El número de cuenta está en la primera página de este “Nia Ponto”. Y no olvidéis que **<u>las cuotas han cambiado desde este año 2016</u>**:

Cuota normal: 60,00 € anuales. (5 € al mes)
Cuota familiar: 70,00 € anuales. (5,83 € al mes)

Por otra parte, si a la iquierda de estas líneas aparece una “X” roja, es que aun no has pagado, a la fecha de cierre de este “Nia Ponto”, la cuota de socio correspondiente al año 2016.

## Bilbaoanoj en Andaluzia Kongreso.



De la 29-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro, tri bilbaoanoj partoprenis la 20-an andaluzian kongreson de Esperanto, kiu disvolviĝis en Antekera (Malago). Kun ĉirkaŭ 60 partoprenantoj kaj la ĉeftemo “Esperanto kaj Naturo: ĉielo kaj tero”, krom la interesaj prelegoj, eblas substreki la optimisman etoson, kiu regis la kunvenon kaj la ege instruigajn ekskursojn al pitoreska montaro “El Torcal”, kun nokta observado de la steloj; al olivolea muzeo de Antekero; al dolmenoj de La Menga kaj al la urbo mem.

Sur la foto, la tri bilbaoanoj partoprenantaj (Guada, Jesús kaj Iciar) pozas kun Jordi Lietor, kuzo de nia prezidanto, Paco.

## Legita en revuo …

En loka monata revuo eldonita de la Magistrato de Portugalete kaj titolita “enportugalete.com”, ĉiam aperas biografieto de elstaruloj naskiĝintaj aŭ loĝintaj en la urbo. En la oktobra numero, paĝo 22, ĝi okupiĝas pri la pastro **Narciso Irala**, filo de Juan José Irala, fondinto de la konstruentrepreno “Iralabarri”, kiu inter 1908 kaj 1916 konstruis la samnoman kvartalon de Bilbao.

Pri Narciso Irala legeblas: … li vizitis pli ol 50 landojn kaj sukcese prelegis antaŭ la plej diversaj homoj; multe helpis lin lia lerteco por lerni lingvojn; tiel, li parolis la portugalan, la anglan, la francan, la ĉinan (mandarenan), **Esperanton**, …”

## Bilbao parolas Esperanton.



Vidu tiun-ĉi ŝuvendejo de la kvartalo Txurdinaga (str. Gabriel Aresti,5). Ĝi nomiĝas “ŝuo” (Jes; en Esperanto). Ĉu iu konas tiun vendejon? Kaj ĉu ĝian mastron?

*(José I. Orejas. 06/11/2016)*

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

**23-25 jun. 2017**. Kongreso de Hispana E-Federacio (HEF) en Teruel.

**22-29 jul. 2017**. Universala Kongreso de Esperanto, UK-2017 - en Seulo, Suda-Koreio.
Inf.: x, rete: - Retejo ĉe UEA: http://www.uea.org/kongresoj/

**5-12 aŭg. 2017**. IJK, Internacia Junulatra Kongreso - en urbo Aneho en Togolando.

**25-31 jul. 2018**. Universala kongreso en Lisbono (Portugalio).

**H.E.F.**

## Jaro Zamenhof 2017 – Planoj.

Kiel vi ĉiuj jam certe scias, la venontan jaron 2017 estos la datreveno de la morto de Zamenhof. Ni certe devus tion kunmemori (ne celebri!), kaj en la HEF-estraro ni jam komencis cerbumi pri kelkaj aferoj kiujn ni volas plani.

Krom internaj agadoj, mi pensas ke temas pri bona ŝanco iom elkatatombigi nian lingvon, kaj mi jam komencis fari iujn demarŝojn. Ekz. mi rendevuis antaŭ kelkaj tagoj kun respondeculoj de la Pola Instituto pri Kulturo en Madrido kaj de Casa Sefarad (institucio de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj, kiu rilatas al la juda kulturo) pro ties rilato al Zam. Ambaŭ montris tre bonan sintenon pri la kunmemoro, kaj eĉ veran simpation, ĉefe en la lasta kazo. Mi prezentis kelkajn sugestojn, kaj ili aldonis eĉ pliajn. La Pola Instituto ne konkretigis, ĉar ili devas interkonsenti kun la oficialuloj en Pollando, sed Casa Sefarad eĉ proponis daton por la komenco de la agado!

Do, mi resumas kelkajn el tiuj ideoj lanĉitaj, por diskuto, kaj iom-post-ioma konkretigo. Mi aldonas proponojn pri respondeculoj/agantoj, sed sentu vin liberaj aldoni aliajn ideojn kiujn vi mem pretas kunordigi/kunlabori.

Unue: la plej konkreta: Casa Sefarad proponis ke ni prezentu la Jaron Zamenhof en ilia sidejo. Temas pri la tre bela Palaco Cañete en la Calle Mayor de Madrid. Ili jam rezervis por ni la 2-an de februaro 2017 vespere. Ni prelegus pri la figuro de Zamenhof (mi mem pretas), kaj ili mem sugestis ke se ni havas poezion en Esperanto, indus fari deklamadon de poemoj originalaj. Imagu kion mi diris kiam ili tion proponis! Do, POETOJ (ne nur madridanoj!), rezervu tiun daton!

Mi parolis al ili pri ekspozicio, kaj ili diris ke volonte. Ke la sidejo havas lokon por ekspozicio, ĝuste apud la prelegsalono (mi vizitis ambaŭ, kaj jes, tre bonaj). Do: ni havas du ŝancojn: krei specialan ekspozicion pri Zamenhof, por tiu jaro, aŭ uzi (ĉu renovigi?) tiun nunan pri Esperanto. Ili havas vitroŝrankojn por ke la ekspozicio estu pli kompleta, kun libroj, ktp.

Casa Sefarad eĉ invitis nin organizi kurson tie de la komenco de la jaro, aŭ utiligi la sidejon por eblaj "konversaciaj rondoj" unu fojon monate (ili faras tion por lernantoj de la hebrea).

Alia ideo estas la organizado de simpozio pri Zamenhof. Fakte, ion tian jam organizos UEA, verŝajne en Pollando fine de aprilo, kaj estas aliaj planoj pri sciencaj simpozioj. Sed ni povas organizi ion kun la apogo de hispaniaj fakuloj. Mia dubo estas ĉu organizi ĝin en Madrido, aŭ ĉu ni profitu la venontan hispanan kongreson. Mi intencas peti subvenciojn, kaj la decido dependos ĉu ni atingus ilin. Mi ankaŭ intencas kontakti kun universitatoj, kaj ankaŭ tio estus decida faktoro. UNIVERSITATANOJ: volonte mi petas vian kunlaboron jam de nun. Alia afero estas ebla eldonado de libro(j) en la hispana pri Zamenhof (kaj/aŭ Esperanto. Mi komentis kun la institucioj pri tio, ĉar mi pensas ke la ĉefa celo estus atingi eldonadon fare de ekstera eldonejo, ne de ni mem (ĉar tio limigas la disvastigon), eĉ se ni kontribuas. Casa Sefarad sendos al mi kontaktojn kun eldonejoj, sed tiuj el vi kun profesiaj rilatoj, bv. agi. Unua kandidato nun estas la traduko en la hispanan de "La Zamenhof-strato", ĉar ĝia traduko estas jam preskaŭ finita kaj ĝi aperis en multaj lingvoj. Sed aliaj sugestoj aperis, kaj certe mi pretas aldoni aliajn ideojn.

*(Toño del Barrio. 20/10/2016)*

## La venonta hispana kongreso, en Teruel.

Ni deziras informi vin la unuajn, ke en la kunveno de la estraro, kiun ni celebris ĉivespere, ni decidis ke la venonta Hispana Kongreso de Esperanto 2017 okazos en la urbo Teruelo (Aragono), inter la 23-a kaj 25-a de junio (plus eventualaj antaŭ- aŭ post-kongresoj kiujn ni poste decidos). Ĝin organizos la nova loka asocio Liberanimo.

Pri temo, programo kaj ĉiuj necesaj detaloj ni informos iom post iom, sed la unuaj detaloj estas ege kuraĝigaj, kaj ni certas ke temos pri tre bona evento. Do, rezervu jam la datojn, kaj pretu ĝui tre amikan kaj altiran renkonton.

*(José Antonio del Barrio. 11/10/2016)*

## “Lirikaj perloj de Al-Andalus” en la hispana.

Post longa tempo atendante, antaŭ kelkaj tagoj oni eldonis en la hispana lingvo mian libron "Lirikaj Perloj de Al-Andalus" kiun mi jam publikigis en Esperanto en la jaro 1995. Temas pri unu el la verkoj kiu ricevis pli da laŭdojn de elstaraj kompetentaj esperantistoj, kaj ankaŭ plej estimataj de mi mem, en kiu mi esprimas en Antologio la belecon poezian de pli ol cento da poetoj kaj poetinoj kaj mian amon por Al-Andalus kaj ĝia epoko, en kiu floris en nia lando multenombrajn gepoetojn kaj sciencistojn en etoso de kunvivado kaj toleremo de la tri kulturoj kiuj kunvivadis dum tiu epoko. Por tiuj kiuj interesiĝas, la libro estas disponebla por akiri ĝin, sufiĉas ke oni petu per "Amazon" kaj la prezo estas akceptinda.

*(Antonio Marco Botella. 28/10/2016)*

## RETA KOMUNIKADO ĈE HEF.

Baldaŭ alvenos al la hejmoj de la anoj de Hispana Esperanto-Federacio la plej lasta numero de nia revuo “Boletín”. Ni memorigas ke dume eblas ĝin jam legi en la interna spaco de nia retejo, en la adreso *http://www.esperanto.es/hef/index.php/nepublika-zono*.

Ni memorigas ankaŭ ke la anoj disponas je retpoŝta listo, kie ili povas diskuti la temojn ligitajn al HEF, kiel ekzemple la debaton pri la nova statuto de UEA. Ni memorigas ke la adreso estas: *https://es.groups.yahoo.com/groups/hef-anaro* kaj ke oni ne devas timi tro grandan nombron da mesaĝoj, ĉar la celo estas pritrakti nur temojn rekte aŭ nerekte ligitajn al la celoj de la asocio.

Krome, ni rememorigas ke eblas kontakti kun la asocio pere de niaj sociaj retoj, ekzemple per Facebook kaj Twitter kie ni havas respektive ĉ. 1300 kaj 850 ŝatantojn/sekvantojn. Ankaŭ HEJS, nia junulara sekcio, estas tre aktiva per siaj propraj kanaloj:*https://www.facebook.com/juventud.esperanto.hejs/* *https://twitter.com/HEJSesperanto*.

Ne forgesu viziti nian kanalon en Youtube, kun pli ol 70.000 vizitoj (sen konsideri la fratajn kanalojn kun materialo de niaj aktivadoj, kelkaj el kies videoj ricevis pli ol 30.000 vizitojn)

Fine, se vi disponas je la aplikaĵo Telegram en via poŝtelefono aŭ tabulilo, vizitu la multnombrajn kanalojn kreitajn por utiligi Esperanton: *https://telegramo.org/*. Serĉu “hispana agado” se vi deziras kunlabori en niaj aktivadoj.

*(El la “Bitbulteno” de HEF. N-ro. 31. 24/10/2016)*

## Prezento de la k-disko “Esperanto” en Burgos.

*“CronómetroBudú”* estas hispana (Burgos-a) metalrok-ensemblo, kiu decidis nomi sian sesan k-diskon kaj la kanton aperantan en ĝia 3a trako “*Esperanto”*. Krome, la kantisto de la ensemblo, Javier Castro, komponis vere imponan baladon, nomatan “*Luna”*, por kies fina parto li petis de HEF la helpon de esperantisto kapabla deklami la poemon “*Ho, mia kor’”,* de Zamenhof. Plej volonte mi surprenis tiun taskon.

La disko aperis pasintaŭguste. Dum preskaŭ la tuta monato septembro, niaj amikoj turneis en Meksiko, kie ili ĝuas konsiderindan famon, en sukcesa prezentado de la k-disko “*Esperanto”*. La venontan sabaton, la 1an de oktobro, ili faros la unuan prezenton de ĝi en Hispanio, ĝuste en la urbo Burgos, en la koncertejo Hangar, Calle de San Pedro y San Felices, 56, je la 22a. Mi estis invitita partopreni la koncerton por tie deklami rekte la versojn de Zamenhof kadre de la ludo de la kanto “*Luna”*.

Mi invitas kaj instigas ĉiujn esperantistojn loĝantajn en (aŭ pli-malpli proksime de) Burgos ĉeesti ĉi koncerton. “*CronómetroBudú”* meritas nian reciprokadon pro la eksterordinara omaĝo, kiun ĝi faradas al nia afero. Ni pruvu al ĉi ensemblo kaj al ties publiko, ke ni vere ekzistas, ke meritas la penon al artistoj kalkuli je Esperanto por artumi. Ek do al la koncerto!

(La tuta k-disko ĝueblas en YouTube
https://www.youtube.com/watch?v=DkVMkTFGSQI




La kanto “*Luna”*, kie mi deklamas *Ho, mia kor’*, estas la 7a. Alklakante MOSTRAR MÁS, vi trovos i.a. mian esperantigon de la originala teksto de la kanto kaj mian hispanigon de *Ho, mia kor’*).

Sanon kaj muzikon!

*(Miguel Fernández. 29/09/2016)*

## Kaj ankaŭ en Madrido …

Niaj amikoj de la rok-bando *Cronómetrobudú* sendis al mi la ĉi-suban mesaĝon, per kiu ili anoncas la prezenton de sia lasta k-disko, *Esperanto,* en la koncertejo Moby Dick, de Madrido, la venontan 5an de novembro, je la 21a. Inter aliaj kantoj, tie aŭskulteblos *Luna*, en kies lasta parto mi deklamos la poemon *Ho, mia kor’*, de Zamenhof. Sanon kaj muzikon!

*(Miguel Fernández. 14/10/2016)*

## Adhesión, por internet, a la Federación Española de Esperanto.

Ahora, más sencillo: puedes hacerte socio en línea, en el formulario que hemos preparado en: **http://www.esperanto.es/inscripcion**

Además, los nuevos miembros que se apunten antes del final del año recibirán una colección de los últimos ejemplares de nuestra revista.

*(José Antonio del Barrio. 16/11/2016)*

## TRA LA MONDO …

## NOVA RETA KURSO.

Post iom longa atendo, la 26-an de oktobro aperis en la reto nova kurso, en la plej sukcesa kompanio kaj retejo por lernado de lingvoj, Duolingo. Temas pri la kurso por lerni Esperanton pere de la hispana lingvo: https://www.duolingo.com/course/eo/es/.
Jam dum la pasinta jaro estis kreita la kurso por lerni nian lingvon el la angla, kun tre rimarkinda sukceso: pliol duona miliono da homoj aliĝis al lakurso kaj eklernis ĝin.




Eĉ se aspektas logike ke nur procentaĵo finis la tutan lernadon kaj komencis praktiki la lingvon, la kurso revoluciis grandan parton de nia komunumo, ĉefe en Usono kaj aliaj anglalingvaj landoj. Nun, oni esperas ke io simila povos okazi en Hispanio kaj en la amerikaj landoj. Antaŭ la apero de la kurso, 18.000 homoj aliĝis al la informkampanjo, kaj dum la unuaj kvin tagoj, jam 3.000 homoj komencis la lernadon.

## Pri Esperanto kaj Akademio (Socialaj Sciencoj).

Jen alvoko de D-ro Vincente Manzano-Arrondo, kiun mi transsendas kun lia permeso. Mi esperas ke iel vi povos helpi lin pri lia projekto.

“*Mi laboras en la hispana Universidad de Sevilla. Mi estas doktoro pri psikologio, pri edukado, kaj pri ekonomio. Mia esplor-afero estas la akademia sklaveco. Scienco kaj universitato povos fari multe pli bonon ol ili faras hodiaŭ. Sed scientistoj kaj akademistoj suferadas diversajn sklavecojn. Tio malhelpas kelkajn bonajn socialajn celojn. Mi helpas ekstari diversajn aktivaĵojn en la hispana universitato, pri ĉi tiu fronto. Ekzemple, la unua aktivaĵo estu por ke la hispanaj universitatoj akceptu la Esperantan akreditilon B1 por liberigi lernantojn de la lingva sklaveco, rilate difinitajn naciajn ligvojn, kiel la anglan.*

*Ĝuste pri tio, mi revas kontakti kun aliaj socialaj scientistoj, kaj starigi specifan reton, per kiu ni povus videbligi la liberigo-kapablo de Esperanto en (trans kaj per) la akademio. Sekve oni povus organizii kompleksan kaj kreivan kongreson, kaj aliajn konkretajn aferojn kaj aktivaĵojn*

*Bonvolu pardoni min se mi translimiĝis. Same, mi komencas uzi Esperanton kaj pro tio povas esti ke miaj aktualaj esperantaj tekstoj ne estus sufiĉe klaraj.*

*Vincente MANZANO-ARRONDO -* ***vmanzano@us.es***

*(Germain PIRLOT. 02/11/2016)*

## Esperanto en filmo.

En la filmo "Captain Fantastic", dum iu sceno du knabinoj elparolas kelkajn frazojn en esperanto. Sube jen interreta adreso de filmeto kie aperas la tuta interparolo en esperanto. Paĉjo ne multe ŝatas ke la knabinoj parolas en esperanto...

*https://www.youtube.com/watch?v=oqQ-tHVb49w*

(*NOTO: Ŝajne temas pri spektinda filmo, krom tiu eta parto en Esperanto. En normalaj kinejoj*)

## Kurso en grava pariza lernejo.

Tion starigis la dano Jesper Lykke Jacobsen, kiu mem instruas fizikon en tiu supera kaj prestiĝa lernejo, renoma tra la tuta Francio. Li skribas: “Post longa klopodado fare de entuziasmuloj nun oficiale malfermiĝis Esperanto-kurso en la Lingva Departemento de *École Normale Supérieure* (ENS, Parizo), malfermata por ĉiuj studentoj, instruistoj kaj vizitantoj de tiu institucio. Laŭ niaj arĥivoj estos la unua fojo, ke Esperanto-kurso okazas en ENS. Mi zorgos pri la instruado de tiu kurso. Ekzistas jam projektoj daŭrigi la kurson dum pluraj jaroj kaj eventuale dissemi ĝin al aliaj francaj institucioj pri supera edukado. Jen pliaj informoj
*http://www.ecla.ens.fr/spip.php?article179&var_mode=calcul*

Por prepari la kurson, mi kompreneble havas amason da materialo ĉe mi kaj en la reto. Sed pri la aĝogrupo (ĉefe junuloj de 20-25 jaroj) mi pensis, ke eble mi povus ankoraŭ trovi kelkajn taŭgajn tekstojn.“

*(Stefan MacGill, Vicprezidanto de UEA. 08/11/2016)*

## Aplikado de Esperanto en la scienco kaj tekniko.

Se vi ŝatus ekkoni aliajn esperantistojn, interesiĝantajn pri aplikado de scienco kaj tekniko en Esperanto – samtempe kiuj ŝatas bonetose pasigi la tempon – indas partopreni la Esperanto-aranĝon "KAEST" en Slovakio.

Materialoj kaj prelego-tekstoj de pluraj malnovaj KAEST-oj estas troveblaj en la Scienc-Teknika Esperanto-Biblitoeko, STEB ĉe http://www.eventoj.hu/steb/

*(Szilvási László. Lingvo-Studio, L.S.* www.eventoj.hu*. 10/11/2016)*

## Biblioteka progreso.

Ni atentigas vin pri la nova retejo de la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Kolekto por Planlingvoj:
*http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/*

Esperantomuzeo: *http://www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo/*

Pli mallongaj tekstoj, pli da bildoj kaj konciza strukturo zorgu, ke vi facile kaj rapide ricevu deziratajn informojn, kiujn vi bezonas por viaj laboroj en la biblioteko aŭ por via vizito en la Esperantomuzeo.

Ĉi-kune mallonga superrigardo pri la plej gravaj ŝanĝoj:

- La retejo estas plibonigita, por ke vi povu klare legi ĝin sur diversaj iloj kiel (poŝ)komputiloj, tabulkomputiloj kaj saĝtelefonoj.
- Pro la nova menuo vi atingas pli facile la digitajn dokumentojn de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo – librojn, periodaĵojn, dokumentojn pri la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj pri la unua mondmilito.

Libroj:
*http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/libroj/*

*(Stefan MacGill, Vicprezidanto de UEA. 08/11/2016)*

**FELIĈAN KAJ SUKCESAN JARON 2017-AN DEZIRAS AL VI ĈIUJ LA E-GRUPO DE BILBAO**